

BULTENO de REU

№ 89, Aprilo 2017

100-jara datreveno post morto de Lazaro Ludoviko Zamenhof

Karaj gesamideanoj!

Hodiaŭ, en la tago de la 100-jara datreveno post morto de Lazaro Ludoviko Zamenhof, iniciatoro de nia lingvo, ni ĉiuj rememoru liajn helan personecon, agadon kaj heredaĵon. Liaj ideoj pri la tutmonda intergenta interfratiĝo helpe de la lingvo internacia estu por ni la gvida stelo nun kaj ĉiam.

Esperanto-movado konstante ŝanĝiĝas kune kun la ŝanĝoj de la mondo, kio elvokas certajn malfacilaĵojn en nia movado. Ni devas scipovi adaptiĝi al tiuj ŝanĝoj kaj memori, ke en la historio de la movado ekzistis

multe pli malfacilaj periodoj ol tiuj, kiujn ni travias nun, kaj ne perdi optimismon – kiel neniam perdis ĝin nia Majstro: "Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, – ni semas kaj semas konstante".

La Iniciatoro de Esperanto estis plena da iniciatoj. Pro tio aperis kaj ekevoluis nia lingvo, popolo kaj kulturo. Ni imitu lin, kaj havu kiom eble pli da iniciatoj, kiujn ni senlace peni plenumi – nur tiam ni havos sukcesojn kaj la zamenhofa afero – nia komuna afero! – progresos.

Kun deziro de prospero al ĉiu aparta esperantisto kaj al la tuta esperantistaro –

Estraro de Rusia Esperantista Unio

14.04.2017

Konkurso omaĝe al L. Zamenhof

Okaze de la datreveno Estraro de REU anoncas la **konkurson pri traduko al la rusa lingvo de la versaĵo de la Majstro *Ho, mia kor!*** La konkursaĵojn sendu al Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru ĝis 30.06.2017. La rezultoj de la konkurso estos anoncotaj dum RET-2017 en Poŝehonjo.

Esperantisto malliberigita en Moskvo

La aŭtoritatoj akuzas la 25-jaran matematikiston pri disvastigo de “alvokoj al terorismo”. Li estis arestita interalie por malhelpi ke li veturu al Italio, kie li planis ĉeesti esperantistan renkontiĝon.



La 25-jara Dmitrij Bogatov estas membro de la Moskva Esperanto-Asocio MASI. Kune kun sia edzino li planis partopreni la Internacian Junularan Festivalon en Italio de la 12-a ĝis la 18-a de aprilo. Lia nomo estas en la listo de aliĝintoj.

Li tamen ne povis veturi, ĉar li estis kaptita de la polico la 6-an de aprilo pro suspekto pri alvokoj al publika malordo lige kun nepermesita manifestacio, kiu okazis en la centro de Moskvo la 2-an de aprilo.

Laŭ akuzo li sub la kaŝnomo

"Ajrat Baŝirov" en la reto instigis manifestaciantojn porti al la Ruĝa Placo "ĉifonojn, botelojn, benzinon, terebinton kaj ŝaŭmplaston".

Dmitrij Bogatov, kiu laboras kiel instruisto de matematiko ĉe Moskva Universitato de Financo kaj Juro, komplete neas sian kulpon. Laŭ liaj advokatoj la alvokoj sub la nomo de "Ajrat Baŝirov" estis publikigitaj el pluraj IP-adresoj, el kiuj nur unu estas tiu de la loĝejo de la akuzato. Aldone la publikigoj sub tiu nomo daŭris ankaŭ post la aresto de Dmitrij Bogatov.

Laŭ la advokatoj de Bogatov, li same kiel "Ajrat Baŝirov" estas uzanto de la sistemo Tor, kiu permesas anonimam aliron al la reto. Bogatov ŝajne havis en sia hejma servilo elirnodon de Tor, tra kiu la anonimulo "Ajrat Baŝirov" dufoje aliris la reton por skribi siajn alvokojn.

Kiam la sistemo Tor estas uzata, eblas spuri el multaj nodoj nur la lastan, tra kiu anonima uzanto aliras la ordinaran reton. Entute la sistemo Tor havas proksimume sep mil nodojn, el kiuj iom malpli ol mil estas tiel nomataj elirnodoj, tra kiu la sistemo ligiĝas al la malferma reto. Ĉikaze la elirnodon povis tute hazarde esti tiu en la servilo de Bogatov. Eĉ se la alvokoj ŝajnis veni el lia servilo, ili do ne nepre estis skribitaj de li.

La juĝisto unue rifuzis malliberigi la akuzaton, ĉar la imputata krimo ne estis sufiĉe serioza. Tiam la esplorkomitato aldonis novajn, pli seriozajn akuzojn pri "alvokoj al realigo de terorisma agado aŭ pravigo de terorismo pere de interreto" kaj "preparoj por organizado de publika malordo".

La prokuroro subtenis la pozicion de la esplorkomitato kaj krome argumentis, ke Bogatov havas bonajn komputadajn kapablojn kaj tial povas detrui pruvojn pri krimo, se li ne estos malliberigita. Aldone oni atentigis, ke Bogatov havas validan pasporton kaj vizon kaj planas veturi al Italio la 12-an de aprilo.

Bogatov deklaris sin preta fordoni la pasporton kaj resti en Moskvo je la dispono de la esplorado. Krome liaj advokatoj prezentis pruvojn pri tio, ke li ne estis en sia loĝejo, kiam unu el la asertite kontraŭleĝaj alvokoj estis publikigita. Tamen la kortumo decidis malliberigi lin ĝis la 8-a de junio dum la krimesplorado daŭros. Pluraj komputiloj de Bogatov estis konfiskitaj.

En intervjuo de la retejo *Meduza* la patrino de Dmitrij Bogdanov opiniis, ke la akuzoj estas absurdaj:

– Li ja ne ofendus eĉ kateton, kiaj alvokoj al publika malordo? Li kaj lia edzino, ŝi estas genetika biologo, ili jam de pluraj jaroj manĝas nenion mortigitan. Ili ludas ŝakon, ili lernis Esperanton en tri monatoj kaj intencis veturi al internacia kongreso.

Laŭ Irina Gonĉarova, kunordiganto de la Moskva Esperanto-Asocio MASI, Dmitrij Bogatov kaj lia edzino finis la bazan kurson de Esperanto en oktobro 2013 kaj de tiam estas sufiĉe aktivaj membroj de la klubo.

– Ekde ilia veno al Esperanto ni regule komuniĝas. Mi ne nomus ilin aktivuloj, sed ili volonte ĉeestas preskaŭ ĉiujn MASI-aranĝojn, elpaŝas kun sciencaj prelegoj en Esperanto, ŝatas akcepti gastojn en sia hejmo por tabloludi. Ili estas bonaj amikoj, helpemaj, gajaj kaj justemaj. Estante absolute indiferentaj al politikaj aferoj, ili estas “por ĉio bona”: vegeteranas, dise kolektas rubaĵojn, emas neniun ofendi. Kompreneble, neniu el ni kredas, ke Dima estas krimulo. Ne mirindas, ke por subteni la gejunulojn ne nur mi, sed ankaŭ aliaj MASI-anoj ĉeestis la juĝadojn la 8-an kaj la 10-an de aprilo. Mi scias, ke por li nia ĉeesto estis grava.

Irina Gonĉarova forte esperas, ke la afero bone solviĝos kaj ne malutilos al la famo de Esperanto en Rusio.

– Por la reputacio de MASI ĉi tio povas esti tre malbona: neniu profundigos en la veron, oni englutos ajnan oficialan version, ekzemple ke Esperanto estas masona sekto kaj MASI – nesto por produkti teroristojn.

Libera folio, 17.04.2017, <http://www.liberafolio.org/2017/04/17/esperantisto-malliberigita-en-moskvo/>

Oni pri ni

Amaskomunikiloj pri la 100-jara datreveno post forpaso de L.M. Zamenhof

La ruslingvaj amaskomunikiloj, bedaŭrinde, tre magre reflektis tiun eventon. La gazetara komunikilo, dissendita de REU, aperis, laŭ niaj scioj, nur 3-loke, en du rusiaj kaj unu ukraina portaloj:

Новая неделя: <http://chelny-week.ru/2017/04/100-let-so-dnya-smerti-vydayushhegosya-gumanista-lazar'ya-lyudviga-markovicha-zamengofa/>

PR|online: <https://www.pronline.ru/100-ia-ghodovshchina-so-dnia-smierti-LM-Zamienghofa-14-aprielia-2017-ghoda.html>

UkrDay.com: <http://ukrday.com/zhizn/novosti.php?id=170883>

Krome, sufiĉe granda informo sur alia bazo (ne tiu, kiun sendis REU) aperis en "Kalendaro de eventoj":

CALEND.RU - календарь событий: <http://www.calend.ru/person/3254/>

En kelkaj aliaj TTT-ejoj aperis unuliniaj mencioj pri la datreveno.

Ankaŭ granda informo estis en "Radio Svoboda": <http://www.svoboda.org/a/28421158.html>

Krome, la televida elsendo "Euronews" (ruslingva versio) informis 14.04 pri la evento.

En kelkaj alilandaj ruslingvaj portaloj (aŭ ruslingvaj sekcioj de ties plurlingvaj portaloj) ankaŭ aperis informoj pri la dato kaj pri L. Zamenhof:

Одесский портал: <http://odportal.com.ua/data/zamengof.html>

4strongman: <http://4strongman.com/service/calendar/view/6454/rip>

Radio Praha: <http://www.radio.cz/ru/rubrika/radiogazeta/svitavy-pomnyat-o-sozdatele-obnadezhivayushchego-yazyka>

DW: <http://www.dw.com/ru/v-germanii-poyavilas'ya-ploshad'-imeni-doktora-esperanto/a-38367101> kaj <http://www.dw.com/ru/немецкая-столица-эсперанто/a-16123877>

Еврейский интернет-клуб:

<http://base.ijc.ru/new/site.aspx?IID=261263&SECTIONID=244685&STID=245090>

Nikolao Gudskov, Mikaelo Ĉertilov, Ludmila Novikova

MER-9



15.04.2017 Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova okazigis 9-an **Moskvan Esperanto-renkontiĝon**. (MER-oj estas propra aranĝo de la organizantoj, sendependa de kiu ajn asocio aŭ klubo.) Partoprenintoj: 21 (inter ili: 3 kursanoj de Esperanto-kursoj en RUDN).

Programo:

- Ideaj ŝanĝoj en teorio kaj praktiko de lingva kreado. Nikolao Gudskov
- Interrilatoj de Baghy kaj Kalocsay. Valentin Melnikov
- Prezento de la nova libro, eldonita de Impeto, en traduko de Klara Ilutoviĉ

- La jud-pola bardo Gebirtig. Mikaelo Bronŝtejn
- Literatura vespero. Ludmila Novikova, Valentin Melnikov, Aleksej Nistratov ka.
- Estontaj kaj pasintaj E-renkontiĝoj. Mikaelo Bronŝtejn, Aleksandr Lebedev ka.
- Koncerto de Mikaelo Bronŝtejn

Skriba KER-sesio en Moskvo ĉi-jare

Skriba KER-sesio ĉi jare en Moskvo okazos la 10-an de junio. La skriba ekzameno laŭ internaciaj postuloj de Komuna Europa Referenckadro estas organizata en Moskvo jam de kelkaj jaroj. Laŭ la kvanto de ekzamenitoj Moskvo estas en la tria loko inter 70 landoj kun ĝis nun 134 sukcesintoj.

Eble ni povus veni al la dua loko, se niaj esperantistoj, aktivuloj kaj novuloj pli aktive kaj serioze rilatus al ĉi tiu ekzameno. La ekzameno pritaksas la nivelon de tri bazaj lingvokapabloj: bazan, mezan kaj superan. Tiuj niveloj konformas al la priskriboj de KER je B1, B2 kaj C1. Krome, oni ricevas ateston pri la ekzameno en 4 lingvoj. Limdato por registro al la skriba sesio en Moskvo estas la 1-a de majo 2017. Kun petoj, demandoj bonvolu turni vin al la ĉeforganizanto de la KER-sesio, reprezentanto de ILEI en Rusio Svetlana Smetanina. Bonvenon!



Informoj kaj raportoj

11 Lingva Festivalo en Peterburgo

Estis registritaj kvincent kelkdek partoprenantoj.

Oni prezentis 34 lingvojn kaj kelkajn lingvistikajn prelegojn (i.a. „Artefaritaj lingvoj“).

Fotojn rigardu ĉe — https://vk.com/album-51324655_242780049

Alilandaj esperantistoj en Rusio

Ĉi somere laŭvoje al la 102-a Universala Kongreso en Seulo (Suda Koreio) Sankt-Peterburgon kaj Moskvon transite vizitos kelkaj grupoj de alilandaj esperantistoj. Ni invitas vin kunpartopreni la akcepton, laŭ viaj tempoeblecoj renkonti-akompani-ĉiĉeroni, helpi. Simple komunikiĝi.

3.07 – 5.07, Moskvo, grupo de koreoj, japanoj, francoj, poloj. Entute 14 personoj.

4.07 – 7.07, St-Peterburgo, grupo de francoj, germanoj, belgoj – ĉ. 20 personoj.

7.07 – 10.07, Moskvo, grupo de francoj, belgoj, svisoj, germanoj – ĉ. 40 personoj.

Kontaktoj pri via helpo, ĉiĉeronado, kunesto - al Sv. Smetanina

Rezultoj de la poezia traduk-konkurso

La ĵurio en la konsisto de Nikolao Gudskov, Valentin Melnikov kaj Svetlana Smetanina pritaksis la versaĵojn, venintaj al la konkurso pri traduko al la rusa de la poemo de E. Miĥalski «Kristaloj de neĝo, facetoj glaciaj...». Venis entute 4 konkursaĵoj, el kiuj 2 – el Vladivostoko. Ni gratulas la urbon pri la poezia vervo! Unuanime la unua loko estis aljuĝita al Ludmila Novikova (Moskvo), la ceteraj versioj ricevas laŭdajn menciojn. Ni gratulas ĉiujn konkursantojn kaj alvokas ĉiujn al plia kreado kaj partopreno en la tradukkonkurso pri la Zamenhofa «Ho, mia kor'».

| | |
|---|--|
| <p>Eŭgeno Miĥalski Kristaloj de neĝo , facetoj glaciaj Kaj varma altuŝo de ŝia manet’ – Jen estas la tempo por belfantazio De juna flamema, amanta poet’ !</p> <p>Kupolo ĉiela kun brila stelĥoro, Rapida flugkuro de glitveturil’ , Subita konfeso pri sento de l’ koro Sub lula kareso de la sonoril’ !</p> <p>Kaj ŝajna konfuzo de la junulino, Persista konvinko kun kisakompan’ , Subita neĝfloka ŝutiĝ’ de sur pino, Kaj ruza ridet’ de l’ okulo-cejan’ !</p> <p>Bruet’ veturila sur neĝo krakanta , Kaj ronk’ de ĉevaloj, jam lacaj pro kur’ – Jen estas inspiro por juna amanto De liaj konfesoj , promesoj kaj ĵur’!</p> | <p>Lubovj Karpeta, Vladivostoko Легкие снежинки, грани ледяные, И руки касанье так волнует кровь. Время для фантазий – годы молодые, И в душе поэта расцвела любовь.</p> <p>Весь небесный купол звёздами сияет, Лихо мчатся сани в снежную вуаль. От признаний нежных сердце замирает И уносит ветер бубенцов печаль.</p> <p>Вот сосна роняет с веток хлопья снега, На ресницах милой и слеза. А от поцелуя в сердце боль и нега, Светятся лукаво синие глаза.</p> <p>И саней шуршанье по дороге снежной, Сиплый храп усталых, быстрых лошадей. Время вдохновенья юности мятежной, Клятв и обещаний верности своей.</p> |
| <p>Gennadij Ŝlepĉenko, Vladivostoko Снег кристально чистый зимнею порою, лёгкое касанье её теплых рук – юного поэта с пламенной душой, вот момент рожденья для любовных мук!</p> <p>Быстрой птицей мчатся вдоль дороги сани, о красе созвездий не хватает слов – миг в любви безмерной смелый жест признанья под мотив шепчущий душу бубенцов.</p> <p>Кажется в смущеньи юная кокетка, клятвы, поцелуи, от любви экстаз, падают на землю хлопья снега с ветки, нежное лукавство васильковых глаз.</p> <p>Снега скрип, скольжение вдоль дороги саней, от безумной гонки слышен храп коней – вот что вдохновляет юношей, и манит к клятвенным признаньям о любви своей.</p> | <p>Nikolao Nechajev, Irkutsk Кристаллы снежинок и крепость мороза, И тёплой касанье подруги руки - Вот время для пеня, для света, для грёзы, И в сердце горят и горят огоньки!</p> <p>А купол небесный весь в блеске созвездий (!) Над бегом певучим и быстром саней, Под этой блестящей певучею бездной Любовь моя слаще и чувство сильней.</p> <p>Но кажется ей, что признание рано И слишком горячи объятия мои. Во мне заживает сердечная рана, Во мне просыпаются вновь мотыльки.</p> <p>Меня вдохновляют ночные лишь звёзды И хрип вдруг уставших от бега коней. Любовью и радостью полнится воздух, И радость с минутою каждой сильней.</p> |

Ludmila Novikova, Moskvo

Кристаллы снежинок, ледышек игривых,
Тепло её рук из песцовых манжет -
Пришло твоё время фантазий красивых
И юных восторгов, влюблённый поэт!

Блестящий хор звёзд, и под куполом вечным
Стремительный бег лошадей и саней,
Признание любимой о чувстве сердечном
Под звон бубенцов, колыбельной нежней!

Смущенье игривое юной кокетки,
вдогонку словам - поцелуев размах,
Внезапный снежок, кем-то брошенный с ветки,
Смешинок проскок в васильковых глазах!

Шуршанье полозьев по снежному полю,
И хрип лошадей, и трескучий мороз -
Поэту влюблённому то-то раздолье
Для всех его чувств, вдохновенья и грёз!

120 jaroj al P. Astafjev

Ĉi-jare samaraj esperantistoj festas 120-jaran jubileon de ilia samurbano - Pjotr Jefimoviĉ Astafjev (7 julio 1897 – 23 januaro 1987), kiu estis bona poeto kaj tradukisto. En la “zamenhofa monato” ni celebras lian memoron per publikigo de lia traduko de “Mia Penso”.

МОЯ ДУМА


Л.Л.Заменгоф

В летний вечер на заходе,
В поле, дальнем от селенья,
Песнь подруги в хороводе
Про надежды и томленья,
И о жизни, что разбилась,
Повествует, сострада...
Рана вновь моя открылась,
Кровоточит, изнывая...
«Сударь, спите? Что такое?
Что вы словно изваянье?
Ах, наверно, дорогое
Детских лет воспоминанье?»
Что скажу я? Не печальной
Речь свою вести мне надо
Барышне, с прогулки дальней
Отдохнуть присевшей рядом.
Моя дума – груз сомнений,
И надежда, и страданье!
Сколько жертвоприношений
Отдал вам в ночном молчанье?
Что имел всего дороже,
Это юность золотую,
Долгу властному я тоже
На алтарь принес, тоскуя...
Пламя чувствую в груди я,
Жить, как всем, и мне охота, –



Но где веселы другие,
Там меня все гонит что-то...
Коль судьбе моей не милы
Тайный труд мой и стремленья,
Пусть сейчас сойду в могилу,
Но в надежде, без мученья!

Novaj libroj



Fabeloj de A. Kuprin

Aleksandro Kuprin estas aŭtoro ne nur de noveloj, romanoj, rakontoj, sed ankaŭ de fabeloj. Tiu aspekto de la granda verkisto estas malpli konata, sed ja sufiĉe grava. Eldonejo Impeto ĵus aperigis 80-paĝan kolekton de 12 liaj fabeloj en la nova libro "Magia tapiŝo". Ĉiujn fabelojn tradukis konata moskva esperanta poetino Klara Ilutoviĉ en konvena kaj adekvata al la originaloj stilo. Dezirantoj akiri la libron turnu sin al la TTT-ejo de *Impeto* <http://lernolibro.ru>. Agrablan legadon.

En la mondo

Subtenu Esperanton ĉe la pola parlamento!

La 7-an de aprilo 2017 la Pola Parlamento per aklamado akceptis rezolucion pri la memorigo de Ludoviko Zamenhof okaze de la 100-a datreveno de lia morto.

S-ino Anna Wasilewska (*parlamentanino el la urbo Olsztyn, neesperantistino*) kiel prezidanto de la "parlamentara grupo por subteno de la lingvo Esperanto" preparis la projekton de la rezolucio.

Vi povas subteni la parlamentan poresperantan agadon en Pollando, se vi esprimas vian atenton pri la menciita rezolucio, kaj sendas retroŝtan gratulon kaj dankon al subaj retadresoj de anoj de la pola parlamenta subtena grupo.

- Anna.Wasilewska@sejm.pl - prezidanto
- Krzysztof.Truskolaski@sejm.pl - vicprezidanto
- Andrzej.Maciejewski@sejm.pl
- Pawel.Bejda@sejm.pl
- Anna.Bialkowska@sejm.pl
- Piotr.Cieslinski@sejm.pl
- Tomasz.Cimoszewicz@sejm.pl
- senator@Czarnobaj.senat.pl
- Grzegorz.Furgo@sejm.pl
- Tomasz.Kucharski@sejm.pl
- Katarzyna.Osos@sejm.pl
- Michal.Stasinski@sejm.pl
- Elzbieta.Stepien@sejm.pl

Jen la ligilo al la koncerna retpaĝo de retpaĝaro de Pola

Parlamento: <http://www.sejm.gov.pl/sejm8.nsf/komunikat.xsp?documentId=C46335BE3AC0AB56C12580FB0033454D>

Dankante vian kunlaboron,

Marian Zdankowski
Novaĵservo Ret-Info / Lingvo-Studio

RUSIAJ ESPERANTO-TAGOJ 2017

Karaj realaj kaj eventualaj partoprenantoj de RET – 2017!

La somero proksimas kaj ni refoje invitas vin pensi pri viaj kontribuoj al la komuna programo. Sukceso de la aranĝo dependas de ni mem. Restas ankoraŭ liberaj lokoj kaj la aliĝperiodo daŭras.

En la programo antaŭvidatas diversaj lingvaj kursoj, Somera Universitato pri la temo de la aranĝo kaj ankaŭ la aliaj temoj. Funkcios atelieroj: literatura, kanta, traduka.

Vesperaj koncertoj de konataj bardoj kaj muzikistoj Mikaelo Bronŝtejn, Andreo Obrezkov, Mikaelo Povorin, Evelina Sokolova ne lasos vin indiferenta. Kvizoj, konkursoj, surtablaj kaj lingvaj ludoj. Dum la programo, dediĉita al pastro-esperantisto Ivan Ŝirjaev, vi ne nur ekskocios ion pri liaj verkoj kaj biografio, sed ekskursos al lia vilaĝo, kie



konserviĝis la gepatra domo kaj funkcias muzeo. Okazos liturgio en Esperanto.

“Ronda Tablo” estos malferma por pridiskuti diversajn movadajn, instruistajn, eldonajn k.a. problemojn. Funkcios riĉa Libroservo.

Eksursoj buse dum RET planatas al urboj Tutaev kaj Ribinsk.

En libera tempo eblos naĝi, sunbruniĝi, sportumi, bicikli, boati.

PostREta programo invitas al dutaga restado en antikva urbo Jaroslavl kaj unutaga vizito al Kostroma.

Karaj, bonvolu prepariĝi por aktiva partopreno en Rusiaj Esperanto-Tagoj kaj bonvenas viaj novaj kaj malnovaj allogaj kontribuoj!

Bonvolu sendi ĉiujn proponojn, kontribuojn al nikolao@yandex.ru kaj (aŭ) svsmetanina@yandex.ru

Ekzistas speciala oferto por interesiĝantoj partopreni kručan procesion laŭ bordo de Volgo en la urbo Tutaev. Bonvolu turni vin al pastro Taŭriono en Esperanto ilija@yandex.ru. Ĝi okazos antaŭ RET.

Organiza Komitato de RET

Bonvolu antaŭpagi la loĝadon 50% de la elektota varianto al la kasisto de REU.

Dankon!

BONVENON AL MISTERA POŜEĤONJO!!!

La Bulteno de REU (BdR) atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio